

Nepalo

Invito al la 2a Speciala Ekskurso en Nepalo

Ĉiun duan jaron Nepala Esperanto-Asocio organizas Himalajan Renkontiĝon, en kiu partoprenantoj piedvojaĝas al la montaro. Tamen inter interesitoj pri Nepalo, iuj ne povas/volas piediri en montaro. Por tiuj homoj NEspA organizas Specialan Ekskurson sen piedmarŝado. En februaro-marto 2018 la Asocio invitas vin al tiu ekskurso.

Mi (HORI Jasuo, japano) jam vizitis Nepalon pli ol 10 fojojn, kaj ĉiun fojon mi trovas novan, interesan aferon. Piedmarŝado en montaro estas ja inda, sed ankaŭ inda estas urba kaj vilaĝa vivo. Vizito al Nepalo estos neforgesebla memoro por vi. (Foto: Himalaja Renkontiĝo en marto 2017. Mi estas la tria de maldekstre en la dua vico.)



Jen estas detala itinero:

02/26 2018: Alveno al Katmanduo, Nepalo kaj enhoteliĝo.

02/27: Vizito al la temploj Baŭdnath (budha) kaj Pasupathinath (hindua)

02/28: Vizito al la malnova urbo Patano.

03/01: Vojaĝo al Ĉitlang.

03/02: Vojaĝo al Daman, fama turisma loko, de kie oni povas vidi panorame Himalajon.

03/03-04: Vojaĝo al Ĉitaŭn Nacia Parko, kie oni povas ĝui ĝangalan vivon, elefanto-rajdon, birdobservadon ktp.

03/05: Vojaĝo al Lumbini, naskiĝloko de Budho.

03/06: Vojaĝo al Ŝiburari, kie oni loĝas en la vilaĝa domo kaj ĝuas vilaĝan, etnan kulturon.

03/07: Vojaĝo al Pokhara, bela turisma loko kun lago. Oni povas vidi belan neĝan monton de la boato sur la lago. Reveno al Katmanduo per buso.

03/08: Libera tago (turismo en Katmanduo, butikumado) kaj adiaŭa vespero.

03/09: Ekiro hejmen.

Kotizo: 900 eŭroj por la 11-taga ekskurso, restado en bonkvalita hotelo, 3 manĝoj ĉiutage, enirpagoj por diversaj lokoj kaj transportado.

Pakistano

Estrara kunsido de PakEsA

Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) okazigis estraran kunsidon la 10an de septembro 2017, matene je la 10a horo en la oficejo de PakEsA en la urbo Lahore. Oni diskutis jenajn aferojn.

1. Partopreno en la 102-a UK en Seulo.

Shabbir Ahmad Sial raportis pri siaj partopreno kaj rolo en la 102-a UK en Seulo. Li ankaŭ raportis pri okazintaj agadoj. Fine li donis ricevitaĵajn donacojn, dokumentojn kaj libretojn al Hafiz. Abdul Qudoos, ĝenerala sekretario de PakEsA.

2. Partopreno de PakEsA en okazonta la 103-a UK.

Oni decidis, ke en la venonta jaro PakEsA sendu sian grupon al la 103-a Universala Kongreso.